
# IIIª Kongreso de la Kataluna Esperantista Federacio

## Terrassa, 29ª-30ª Junio 1912ª


La notojn, kiujn ni publicas apud la fotografaĵoj en tiu ĉi Suplemento, ni ŝuldas al la afableco de nia distinginda amiko Sro. Jozefo Ventalló, historiisto de Terrassa kaj Direktoro de la gazeto «La Comarca del Vallés».




*Klaŭstro de la kastelo*

Terrassa estas inda urbo devenanta de la antikva Egara, fondita de la fenicioj. Ĝi estis komerca kolonio, romana komunumo kaj sidejo episkopa.

En jaro 714ª ĝi estis detruita de la arabaj ekokupantoj kaj nur saviĝis la Kastelo el kiu ankoraŭ ekzistas rubaĵoj, antaŭ kies muroj restis venkitaj la maŭraj armeoj pro la kuraĝa malcedo de la Egaranoj, kiuj ĝin defendis. Tiu fortikaĵo estis longatempe konservata kiel bastiono de la sendependeco de l'Patrujo.



*Vidaĵo de la kastelo*



*Turo de Terrassa*


La Turo de Terrassa estis starigita dum la XIVa jarcento kaj formis parton el la palaco de la Templanoj kaj pli poste ĝi estis aliformigita en malliberejon.

De la diversaj publikaj kaj privataj konstruaĵoj, kiuj, krom la grandaj lanaĵaj magazenoj, beligas la urbon, ja estas pruvo la Urbodomo, kies konstruaĵo ankoraŭ nova kaj ne entute finita, estas el libera, gota stilo.




*Urbodomo, kie okazos la kunsidoj de la IIIa Kongreso*

La paroĥa preĝejo, devenas de la XVI^a^ jarcento. Rimarkinda estas ĝia ĉefa altaro de arta skulptaĵo kaj stilo baroka; ankaŭ estas rimarkinda imagaĵo skulptita sur marmoro, kiu reprezentas Kriston sternita. Bedaŭrinde mankas al la preĝejo, fasado inda je ĝia graveco.




*Paroĥa preĝejo*

La Industria Lernejo, de Artoj kaj Metioj ĝuas meritindan famon. Ĝi havas krom la belega konstruaĵo kiun montras la fotografaĵo, vastan lokon kun lern - laboriloj juĝitaj degranda estimo. Ĝi estas juvelo je kiu fieriĝas la urbo.



*Industria lernejo, kie havos lokon la Esperanta ekspozicio dum la Kongreso*



La Romanaj Preĝejoj nomitaj de Sankta Petro estas tri, kiuj formas grupon: Sankta Mikaelo, Sankta Petro kaj Sankta Mario. Ili estas veraj monumentoj de arĥeologia valoro. Ili enhavas malofta arĥitekturan diversecon kaj konservas ankaŭ belajn rimarkindajn altartabulojn.

Inter la diversaj artaĵoj de ilia roman-epoka konstruo estas enmiksitaj aliaj de gota arĥitekturo, tiel, kiel kolonoj, arkaĵoj, surskribŝtonoj, k. c. restaĵoj el la estintaj detruitaj monumentoj de Egara.